Serio Originala Literaturo Klasika

Ivan G. Ŝirjaev

# Sen Titolo

Originala romano




Plena verkaro, Vol. 3

Vieno, Pro Esperanto 1995

## 1
## Juna paca batalanto

Estis varmega julia posttagmezo. La suno netolereble bruligis la teron kaj la senmovan, sekan aeron. Apudvojaj arboj kun foliaro polvokovrita kaj malgaje pendantaj branĉoj, herbaro velka kaj flaviĝanta, birdoj, jam delonge ĉesintaj la kantadon kaj sin kaŝintaj en la ombro de densaj arbetoj, - ĉio suferis pro la nekutima varmego kaj pro la longedaŭra sekeco, ĉio soifis pluvon.

Laŭ la vojo, glate piedbatita kaj dura kiel ŝtono, malkrute malsupreniĝanta de la vilaĝo al la rivero kaj ĉirkaŭita ĉe ambaŭ flankoj jen de maljunaj abioj nigrecaj, kiuj malproksimen etendis super la vojo siajn branĉojn kvazaŭ manojn, jen de belaj betuloj kun molaj silkaj folioj kaj blanka ŝelo, rimarkebla de malproksime - laŭ tiu vojo malrapide iris Joĉjo, deksep-jara knabo maldika kaj altkreska. Lia blanka jako estis malbutonumita kaj sub ĝi vidiĝis kolora ĉemizo kuntenita de silka zono kun malgrandaj kvastoj. Sur la kapo sidis ĉapelo kun granda sunŝirmileto, kiu duone kaŝis lian ĉarman vizaĝon maldikan kun molaj, belaj trajtoj kaj kaŝtankoloraj okuloj zorg-plenaj. Li malrapide iris malsupren de la monto kaj ĉe ĉiu paŝo li streĉis sian vidsenton antaŭen, kvazaŭ esperante iun renkonti kaj nur malofte li turnis flanken sian rigardon jen malpacience-emociitan kaj plenan de atendo, jen senesperan.

Malsupreniĝante de la monto, li suriris ponton, kondukantan trans la riveron spegule klaran. Longe li staris meze de la ponto, jen rigardante la vojon, serpentumantan tra la bordo kontraŭa, jen atente aŭskultante eĉ la plej malgrandan brueton. Sed la vojo, kiom povis vidi liaj okuloj miopaj, estis dezerta, senhoma kaj en la aero regis silento tombeja, interrompata nur de la flustrado de la akvo sub la ponto kaj de la ekplaŭdoj de grandaj fiŝoj saltantaj fojfoje.

Ekspirinte profunde kaj plenbruste, li forlasis la ponton kaj ankoraŭ pli malrapide ekiris reen, ĉe ĉiu paŝo haltante, returnante la kapon kaj atentante, kiel antaŭe, ĉiun eĉ apenaŭ aŭdeblan sonon.

Kiam li atingis la vojkurbiĝon, de kie oni povis vidi nenion pro la arbetaĵoj densaj kiel muro, li klare ekaŭdis paŝosonojn

rapidajn kaj malpezajn. Li ektremis, kiel subite timigita besteto, kaj volis sin kaŝi inter la arbetaĵoj, sed jam estis tro malfrue kaj vane. Renkonten venis Anjo, samaĝa knabino beleta - la filino de la vilaĝestro. Ŝi estis vigla kaj gaja. Ŝiaj blondaj haroj nekovritaj, zorgeme kunligitaj kaj bele aranĝitaj sur la verto, pendantaj en bukletoj, kiuj petoleme tremetadis super la sunbrunigitaj pufvangetoj kaj la grandaj okuloj, plene harmoniis kun ŝia blanka vestaĵo muslina kun mallongaj manikoj puntaj kaj kun modesta eltranĉaĵo sur la brusto.

La renkontiĝo, videble, estis neatendita ankaŭ por ŝi. Ŝi ruĝiĝis, malrapidigante siajn paŝojn, kaj ekridetis.

- Kiel vi timigis min, Joĉjo!, - ŝi diris, eltirante al li sian molan kaj elastan manon. - Ĉu vi promenas? Venu hodiaŭ vespere promeni al la rivero post la vilaĝo, tie promenos ĉiuj niaj fraŭlinoj.

Joĉjo, ankaŭ ruĝiĝinte, nenion respondis kaj longe ne ellasis el sia mano maldika kaj malmola la manon de la knabino. Li fikse rigardis la knabinon konfuziĝintan kaj ridetis per sia ĉarma, serena rideto.

- Adiaŭ! - diris la knabino. - Venu kaj alportu ian floreton bonodoran el via ĝardeno ... Venu! - ŝi ripetis, liberigante ŝian manon, kaj ekiris malsupren per sia gracia kaj malpeza irmaniero.

Joĉjo nenion respondis. Li staris kiel enfosita kaj rigardis la rapide malaperantan knabinon. Li fikse rigardis ŝian hararanĝon kaj atendis, ĉu ŝi returnos la kapon al li. - „Se ŝi returniĝos al mi," pensis la knabo, „tiam mi... tiam mi ..."

Sed li ankoraŭ ne havis la tempon por klare prezenti al si sian penson kaj diri al si mem, kio hodiaŭ devus okazi, se la knabino returniĝus, kiam la knabino, atinginte alian vojkurbiĝon, haltis por unu momento, ordigis la bukletojn kaj returnis sian vizaĝon.

„Sekve mi ricevos hodiaŭ tion, kion mi atendas", - ekpensis la knabo, ekvidinte, ke la knabino returniĝis al li, kaj opiniante tion bona antaŭsigno.

Lia vizaĝo fariĝis pli gaja kaj malpli zorgatakita ol antaŭe. Post unu momento li ree ekiris malrapide pluen, kiel antaŭe, haltante preskaŭ ĉe ĉiu paŝo, returnante la kapon kaj fikse serĉante ion per la okuloj.

„Kiel bonaj estas niaj fraŭlinoj vilaĝaj", li pensis, ĉiam suprenirante. „Ili tute ne similas al fraŭlinoj urbaj... al tiuj fierulinoj... Mi ne ŝatas ilin! Kial okazas tio ĉi, ke en ĉeesto de la lastaj mi ĉiam konfuziĝas, ne povas eldiri eĉ unu vorton, kaj en ĉeesto de tiaj belulinoj, kiel Anjo, mi estas vere bravulo" - li pensis, fiereme rektigante sian bruston enfalintan kaj bravule metante la ĉapelon sur la nukon.

Sed liaj pensoj estis tuj interrompitaj. Dekstre, tre proksime de li, subite ekaŭdiĝis ies malfacila spirado kaj kolerema murmurado.

- Senlaboruloj! Stultuloj! - baldaŭ Joĉjo ekaŭdis malafablan, maljunan voĉon murmureman kaj, dismetante per la manoj la arbetaĵojn kaj rompante per la piedoj krakantajn sekajn branĉetojn, sur la vojon eliris kun granda korbo da fungoj lia onklo - altkreska, maldika maljunulo kun glate razita vizaĝo kaj longaj grizaj brovoj.

Joĉjo volis sin kaŝi, sed, ion konsiderante, li subite turniĝis kaj, same malrapide, ree ekiris al la rivero, maltrankvile rigardante antaŭen per malpacience zorgatakitaj okuloj.

Hodiaŭ estis dimanĉo. Kaj ĉiudimanĉe (do, unu fojon ĉiusemajne) oni sendis la dektrijaran knabon Demjan al la poŝtejo ĉe la plej proksima stacio fervoja, kiu situis for de la vilaĝo je dek verstoj. Demjan foriradis al la poŝtejo frumatene, preskaŭ samtempe kun tagiĝo kaj antaŭ vespero revenadis hejmen kun leda sako plena je leteroj kaj gazetoj.

Antaŭe Joĉjo tute ne interesiĝis je la ĉiusemajnaj vojaĝoj de Demjan al la poŝtejo kaj reen, sed antaŭ du jaroj okazis al li io, kio tute aliigis lian vividearon kaj de tiam ĉiun dimanĉon li atendis kun malpacienco kaj maltrankvilo.

Antaŭ du jaroj Joĉjo tralegis en la semajna ĵurnalo „Nedjelja" (Semajno), kiun abonis lia patro, artikolon, kiu tre influis lin. La artikolo havis la titolon „Svedoj en Rusujo" kaj detale priparolis jenan okazon neordinaran: du svedoj, studentoj de la universitato en Upsala, **iaj esperantistoj** (Joĉjo neniam ĝis tiam aŭdis tian strangan vorton) vizitis Odeson kaj pasigis tie kelkajn tagojn kun la tieaj **esperantistoj**, parolante pri kio ajn nur **en sia lingvo internacia Esperanto**, ĉar la svedoj tute ne komprenis la rusan lingvon, kaj la rusoj ne la svedan. En la sama

ĵurnalo Joĉjo tralegis anoncon, ke „plena lernolibro de Esperanto" estas ricevebla de ĝia aŭtoro (Varsovio) kontraŭ unu poŝtmarko je 7 kopekoj. La artikolo kaj la anonco tiel ekinteresis la knabon, ke li sin turnis al la patrino, petante klarigojn. La patrino mem aŭdis je la unua fojo pri tiu ĉi lingvo kaj konsilis demandi pri la objekto, kiu tiom interesis Joĉjon, la plej aĝan fraton, kiu estis instruisto de loka lernejo kaj estis opiniata de la familianoj instruito. La plej aĝa frato, kun profundpenseco kaj mokemo, tiom propraj al ĉiuj veraj instruituloj, klarigis, ke Esperanto estas unu el la tiel nomataj artefaritaj lingvoj, kiuj naskiĝas kiel fungoj post pluvo, kaj... mortas, atentata de neniu, kaj ke artefarita lingvo estas sensencaĵo, je kiu povas interesiĝi nur stultuloj. „Se vi deziras lerni fremdan lingvon, vi lernu la lingvon germanan", - li aldonis, - „kaj Esperanton kaj ĝiajn similulojn sennombrajn ni lasu al stultuloj...

Tiom konvinkiga parolo de la „instruito" tamen ne havis la deziratan efikon; kontraŭe, ĝi nur pligrandigis la scivolon de la knabo, kiu ĉiutage aŭdis, ke la frato, la onklo kaj la gepatroj nomis lin ĝuste „stultulo" kaj tiu cirkonstanco havis decidigan signifon. La knabo, laŭ la adreso montrita, sendis en letero la necesan poŝtmarkon kaj baldaŭ ricevis responde malgrandan libreton, kiu entenis antaŭparolon, gramatikon, legmaterialon kaj vortareton Esperantan - rusan.

La komenco estis farita.

Kun granda atento kaj ne malpli granda estimo la knabo tralegis la libreton. La lingvo montriĝis tiom simpla kaj la vortareto, pro la eblo krei per helpo de sufiksoj kaj prefiksoj sennombran kvanton da novaj vortoj el la vortoj montritaj en la vortareto kaj pli ofte prenitaj de la aŭtoro el la latina lingvo, kiun Joĉjo estis ellernanta, - tiom eta, kompare kun la vortaregoj de la latina kaj greka lingvoj, ke iel nevole la knabo eksentis en sia animo, ke li uzos ĉiujn fortojn por ekposedi la lingvon kaj jam neniam forlasi ĝin, kiajn ajn mokojn oni ĵetus al li, kiel ajn oni opinius lin pro tio „stultulo". Sed por tio estis nesufiĉa la lernolibro.

Sur la malantaŭa paĝo de la kovrilo de la lernolibro li trovis neatendite du anoncetojn, kiuj altiris lian atenton kaj tiel ekinteresis lin, ke li ne povis trankviliĝi antaŭ ol skribi al la aŭtoro de la lingvo kun peto sendi al li „Plenan kurson de la lingvo Esperanto",

kiu konsistis el du vortaroj kaj kvar legolibroj kaj ĉiu-monatan gazeton, eldonatan en tiu lingvo.

Atendante la librojn, pri kiuj Joĉjo pensis senĉese, kion ajn li faris, kaj eĉ sonĝis, li sin okupis je serioza kaj detala studado de la gramatiko kaj la vortareto.

Joĉjo havis karakteron kaŝeman kaj li ĝenerale nevolonte lasis scii iun pri siaj sekretoj, eĉ ne la patrinon kaj la du gefratojn pli junajn, al kiuj pli ol al iu li sentis aldonitecon, sed nun, kvazaŭ timante ion, kvazaŭ ne dezirante, ke oni submetu al mokoj **lian** lingvon (en sia animo Joĉjo nomis la lingvon ne Esperanto, sed **mia** lingvo, ĉar ŝajnis al li, ke krom li neniu estas kapabla inde taksi ĝin kaj ŝati), li nenion diris eĉ al la patrino. Ricevinte la librojn, li fariĝis tiom gaja kaj feliĉa, ke ĉiuj familianoj tuj rimarkis en li tiun ĉi ŝanĝon, kvankam ili ne vidis la kaŭzon. La libroj, malgraŭ ilia neatendita maldikeco, kiu tiom surprizis Joĉjon komence, estis tiom interesaj, ke li longe ne sciis, kiun el ili li preferu. Inter ili estis la „Dua Libro", „Aldono al la Dua libro", „Neĝa blovado" kaj la unua kajero de „Hamleto". La lasta estis evidente ĵus eldonita kaj konservis la freŝan odoron de la preskolorilo, kiu multe plaĉis al la knabo.

Kvankam Joĉjo, longe atendante la librojn, bone ellernis ĉiujn mallongajn regulojn de la gramatiko kaj ĉiujn vortojn, kiujn entenis la malgranda vortareto de la lernolibro, tamen tiuj ĉi scioj tuj montriĝis nesufiĉaj, - li eĉ unu linion de „Neĝa blovado" ne povis kompreni sen helpo de la granda vortaro ĵus ricevita. Sed tiu ĉi cirkonstanco ne mortigis la energion de la knabo, kontraŭe la energio kaj forta deziro venki ĉiujn malhelpojn kaj ekposedi la lingvon pligrandiĝis laŭmezure de la malfacilaĵoj aperantaj.

Uzante specialan kajeron, li komencis enskribadi en ĝin komence vortojn nekonatajn, poste la ruslingvan tradukon de la rakonto. La laboro pro sia noveco kaj intereso nun jam plene ekposedis la knabon. Sed Joĉjo ne kontentiĝis nur je legado de la literaturo ricevita, tio ĉi estis nesufiĉa por li. Li revis pri korespondado kun samideanoj. Laŭ lia peto, la aŭtoro de la lingvo sendis al li kelkajn adresojn de rusaj kaj eksterlandaj esperantistoj kaj de tiam la knabo komencis sendadi unu post la alia leterojn eksterlanden. Lia entuziasmo estis nepriskribebla, kiam li komencis ricevadi respondojn. Ĝuste antaŭ unu semajno la knabo leter-

portisto alportis al Joĉjo poŝtkarton el Portugalujo, per kiu lia nova korespondanto el Porto sciigis, ke samtempe estis sendata al li rekomendite granda letero, enhavante krom priskribo de la urbo ankaŭ fotografaĵon kaj luksan albumon da vidaĵoj de la urbo kaj iajn aliajn interesindaĵojn. Efektive, samtempe kune kun la poŝtkarto Joĉjo ricevis avizon de la poŝtejo pri ricevo de eksterlanda rekomendita letero je lia nomo. Tio ĉi estis tre granda surprizo por la knabo, sed la leteron li povis ricevi de la poŝtejo ne pli frue ol post unu semajno (t.e. hodiaŭ), kaj tiu cirkonstanco estis turmentiga kaj doloriga. Vane Joĉjo penis, kiel eble plej malmulte pensi pri la letero ricevota, - ju pli proksima estis la dimanĉo (la tago, en kiu li povis ricevi ĝin), des pli la tagoj ŝajnis daŭri kiel jaroj, kaj des pli lia pacienco konsumiĝadis kaj la ĝojo, kiu antaŭ nelonge aperis al li kiel senfine daŭronta, iom post iom anstataŭiĝis de malgajeco kaj sopiro. Li fariĝis distrita kaj malvigla. Eĉ dum noktoj li ne povis trovi trankvilon, neforpeleblaj pensoj pri la letero ricevota forpeladis dormon, kaj kiam fine ĝi ĉirkaŭkaptadis per siaj fortaj brakoj lian delikatan kaj maldikan korpon, sonĝoj inkubaj daŭrigis turmentadi lin.

Li sonĝis jen pri granda, dika poŝtpakaĵo, kiu enhavis la leteron kaj fotografaĵojn, jen pri la onklo, kiun neniu krom la patrino ŝatis kaj kiu forprenis de li la leteron ricevitan kaj metis ĝin ien en sian ĉambron misteran kaj ĉiam ŝlositan, jen pri la frato, kiun oni opiniis instruito, kiu subite aperis, anstataŭante la onklon, kaj dum foresto de Joĉjo disŝiris la leteron ĵus ricevitan kaj ankoraŭ ne trarigarditan dece, jen pri iaj voĉoj nekonataj, kiuj komence flustris tedeme en liajn orelojn, poste, ĉiam plilaŭtiĝante kaj jam kriegante laŭtege, ripetadis la vortojn ofendajn, nemerititajn kaj maldelikatajn: „Stultulo! Stultulo!" Tiel la afero daŭris ĝis hodiaŭ.

Hodiaŭ Joĉjo vekiĝis frumatene kun ĝoja kaj klara antaŭsento de io bona, kvankam li longe, sidante sur la lito kaj frotante la okulojn dormemajn, ne povis kompreni, ke estis dimanĉo, ke vespere li povos ricevi la poŝtaĵon. Rapideme vestiĝinte, li malfermis la pordon al malgranda balkono, kiu estis tute ŝirmita de ĉiuj flankoj de hela, en kelkaj lokoj jam flaviĝanta pro longedaŭra sekeco, kreskaĵaro. La vetero kvazaŭ intence estis konforma al lia ĝoja humoro. La suno serene ludis de la ĉielo sennuba sur la foliaro de la arboj, sur la herbaro kaj ĝardenfloroj ornamitaj per malgrandetaj

gutoj de roso kiel per perloj. Birdoj, vigle pepante, saltis laŭ la branĉoj, klopodeme kaj senlace plenumante sian taskon nerimarkeblan kaj nekompreneblan por homoj, indiferentaj al ĉiuj belaĵoj de la naturo, sed saĝege destinitan al ili de la Kreinto. De la arbobranĉoj, de la ĝardenfloroj ventumis malvarmeto agrabla kaj freŝiganta per sia spirado kaj ebriiganta per sia virga bonodoro matena, ne difektita de homoj.

Sentante nekompreneblan malpezon kaj ĉiam ridetante per siaj bonaj kaŝtankoloraj okuloj, Joĉjo malsupreniĝis senbrue en la ĝardenon kaj plenbruste enspiris la malvarmete-malsekan aeron bonodoran. Trairinte longan betulan aleon ombroriĉan, li preteriris vicon da pomarboj, kies branĉoj jam kliniĝis malsupren pro abundeco de fruktoj, ankoraŭ malmaturaj, kaj haltis antaŭ la florbedoj.

Li sidiĝis sur ĝardenbenkon kaj komencis amadmiri la florojn, kiuj, kiel luksa tapiŝo diverskolora, kuŝis apud liaj piedoj, frapante la rigardon per freŝeco de koloroj kaj groteska kombinaĵo de nuancoj. Altkreskaj fieremaj peonioj kaj malvoj trudeme kaj fanfarone prezentis siajn grandajn kaj pompajn florojn, kiuj rigardis el sukplena, abunda foliaro. Ne malpli allogaj, tamen pli modestaj, diverskoloraj asteroj, kiel petolulinoj-knabinoj, jen sin kaŝis post najbaraj floroj, jen, ruze ridetante, balancetis siajn kapojn. Graciaj, delikataj levkojoj, blankaj kiel la unua neĝo kaj hontemaj kiel fianĉinoj en sia luksa edziĝofesta vestaĵo, eliĝis per sia blankeco kaj pitoreskaj volvaĵoj de siaj folietoj tiom similaj al bukloj de ia belulino-blondulino. Diantoj...

Sed kiam la rigardo de Joĉjo falis sur la diantoj, lia koro ĝoje ekbatis kaj liaj gajaj okuloj lumiĝis pro bona rideto. Tiuj ĉi diantoj rememoris al li unu antaŭnelongan, tamen tute forgesitan okazintaĵon.

Vespere dum la dimanĉo pasinta, intencante iri en la vilaĝan administrejon por ricevi tie korespondaĵon ĵus alportitan de Demjan de la poŝtejo, li preteriris la florbedojn kaj senintence forŝiris unu dianton kaj, irante, li longtempe flaris ĝian aromon kaj kisis ĝiajn folietojn delikatajn kaj, fine, metis ĝin akurate en butontruon de sia jako.

En la administrejo estis neniu, krom la vilaĝanestro - la patro de Anjo - kaj la skribisto. La vilaĝanestro estis en bona, festa

humoro. Li afable salutis Joĉjon, amike premante lian manon, ridetante kaj gaje fermetante siajn ruzajn okulojn, li diris:

- Vi, Joĉjo, malfruiĝis hodiaŭ. Viajn leterojn antaŭlonge Demjan mem forportis en vian domon. Sidiĝu, mi delonge ne vidis vin.

Joĉjo rifuzis kaj, salutinte la estron, intencis jam foriri, kiam la vilaĝanestro haltigis lin ĉe la mano:

- Sidiĝu! Kien vi rapidas? Ĉu al promeno kun knabinoj? Nu, vi ne malfruiĝos...

Joĉjo ne intencis iri promeni, sed la vortoj de la vilaĝanestro kaj lia rideto konfuzis lin. Li staris ruĝiĝinte kaj mallevinte la okulojn, nenion parolante.

- Kian floreton vi kunportas hodiaŭ! Nu, fraŭlinoj estu singardaj! Al kiu el ili, diru al mi, vi prezentos la floreton? Kiu estas via elektitino? - li daŭrigis ŝerĉi, ĝuante la konfuziĝon de la junulo.

Joĉjo tute ne intencis tiam promeni kun knabinoj, kion ja ne aprobis liaj gepatroj kaj kion li faris nur malofte, sen ilia scio; sed la vortoj de la vilaĝanestro kaj lia aludo neatendita faris tion, ke Joĉjo subite eksentis fortan, nevenkeblan deziron intervidiĝi kun la knabinoj kaj partopreni iliajn ludojn kaj kantadon. Ne revenante hejmen, li ekiris sur la riverbordon, kie, sub maljunaj larĝbranĉaj ulmoj, ordinare dum festaj vesperoj promenis la knabinoj.

La knabinoj, kiuj solaj en siaj festaj ornamoj sidis sur benkoj kaj gaje kantis ion, ofte interrompante la kantadon per ŝercoj kaj laŭta ridado, de malproksime rimarkis Joĉjon kaj ĉirkaŭis lin, kiam li iris sub la ombron de la arboj.

Joĉjo ĉirkaŭrigardis la knabinojn kaj, trovinte inter ili la filinon de la vilaĝanestro, Anjon, kiu diferencis de siaj kunulinoj pro sia modesteco kaj kiun li ŝatis pli ol ian alian knabinon, li eltiris al ŝi la dianton.

La belulino ruĝiĝis, tamen kun ĝoja rideto ŝi tuj prenis la floron kaj koketeme alpinglis ĝin sur la brusto de sia blanka vestaĵo muslina kun mallongaj manikoj puntaj antaŭ la okuloj de siaj amikinoj, kiuj envie rigardis ŝin.

- Joĉjo, donu al mi unu floreton!

- Joĉjo, Joĉjo... donu floreton! - ekaŭdiĝis la voĉoj de la knabinoj.

Joĉjo dismetis la manojn, montrante per tio, ke li ne plu havas florojn, salutis la knabinojn kaj foriris.

- Kien vi, Joĉjo? - ekkriis Anjo. - Promenu kun ni...

Li returniĝis, silente salutis la belulinon kaj per paŝoj rapidaj foriris.

Nun, rememorante tion ĉi, Joĉjo klare prezentis al si la ĝojon de la knabino. Sed liaj pluaj memoroj kaj pensoj estis subite interrompitaj de laŭta sonorado preĝeja, kiu vokis la piulojn al matena festa diservo. Li formetis de la kapo sian ĉapelon, faris respektoplene krucsignon kaj ekiris laŭ la direkto al la preĝejo.

La dimanĉa liturgio finiĝis je la 12-a horo. Rapide fininte la matenmanĝon, Joĉjo forlasis la domon kun malpacience batanta koro kaj zorgatakitaj okuloj ekiris la vojon, sur kiu li esperis renkonti Demjanon revenantan de la poŝtejo kaj kie li, kiel ni jam vidis, dume renkontis nur la fraŭlinon kaj la onklon.

Kiel antaŭe atente aŭskultante eĉ la plej mallaŭtan brueton sur la vojo, Joĉjo atingis tiun lokon, kie li antaŭ nelonge renkontis la fraŭlinon. Li haltis tie, rememorante la neatenditecon de la renkonto kun ĉiuj detaloj, li rigardis tiun vojkurbiĝon, ĝis kiu li akompanis per sia rigardo la belulinon kaj post kiu ŝi, donacinte al li lastan rigardon afablan, malaperis, kiam liaj revoj estis interrompitaj de ies voĉo konata. Joĉjo ektremis nevole kaj ekrigardis laŭ tiu direkto, de kie aŭdiĝis la voĉo. Kelkajn paŝojn for de li sub la ombro de alnaro kuŝis Demjan.

- Kial vi kuŝas tie? - sin turnis la junulo al li.

- Kiu? Ĉu mi? - malrapide kaj demande respondis Demjan, levante sian kapon de la leda sako, plenigita de gazetoj kaj leteroj. - Mi laciĝis. Tre varmege estas hodiaŭ... Mi delonge jam kuŝas, mi jam ne nur unufoje vidis vin preterpasi ĉi tie... - babilis la knabo.

Sed Joĉjo jam ne aŭskultis lin. Per unu salto li atingis la knabon kuŝantan kaj, etendante la manojn, tremantajn pro emocio, al la sako, li demandis:

- Ĉu vi ricevis? Ĉu vi portis de la poŝtejo por mi rekomenditan leteron... eksterlandan?

- Ĉion mi ricevis! - nerapidante, kun grava mieno respondis la knabo, malfermante la sakon. - Nun vi legu, ne enuu, - li aldonis, ridetante.

Alpremante la leteron al la brusto kiel trezoron, Joĉjo kiel sago ekkuris hejmen en sian ĉambron.